

## **SOCIETO YVONNE MARTINOT**

Asocio, kiun regas la leĝo de 1a de julio 1901 kaj la dekreto de 16a de aŭgusto 1961

### **STATUTO**

#### Artikolo 1

Okaze de la konsistiga kunsido de 12a de julio en *Bouresse (Vienne)* estis kreita, laŭ iniciato de la Kooperativa Societo Literatura Foiro, kultura asocio nomata Societo *Yvonne Martinot*, kiun regas la leĝo de 1a de julio 1901 publikigita en *Journal Officiel* la 2an de julio 1901 kaj kies statuto estis deponita ĉe la subprefektejo de *Montmorillon (Vienne)* la 26an de aŭgusto 1985.

La nuna statuto, alprenita dum la ordinara ĝenerala asembleo de la membroj kunvokita en *Bouresse* la 16an de februaro 1997, nuligas kaj anstataŭas a statuton alprenita la 12an de julio 1985. La asocio konservas la nomon “Societo *Yvonne Martinot*” laŭ la nomo de ĝia malavara iniciatintino, kiu dediĉis sin al la afero de la internacia lingvo Esperanto.

#### Artikolo 2

##### **Celoj de la asocio**

La Societo *Yvonne Martinot* havas jenajn celojn:

- instruado kaj praktikado de Esperanto,
- preparado de kandidatoj al la ekzamenoj de Franca Esperanto-Instituto kaj al internaciaj ekzamenoj,
- organizado de staĝoj kaj lingvaj restadoj por klerigi esperantlingajn gvidantojn,
- partoprenado en la antaŭenigo de Esperanto, eventuale kunlabore kun aliaj asocioj kaj aliaj kulturaj organizaĵoj,
- mastrumado kaj administrado de sia centro en *Bouresse*,
- organizado de esplorcentro pri la lingvo Esperanto kaj ties kulturo.

#### Artikolo 2

##### **Oficiala sidejo**

La oficiala sidejo de la asocio estas ĉe *rue du Lavoir, 86419 Bouresse*.

#### Artikolo 3

##### **Membroj de la asocio**

La Societo *Yvonne Martinot* konsistas el aktivaj membroj individuaj aŭ kolektivaj:

- unue el esperantistoj kiuj praktikas aŭ lernas la lingvon
- due el asocioj en kiuj Esperanto estas unu el la laborlingvoj.

#### Artikolo 5

##### **Devoj de la membroj**

Por esti membro de la asocio necesas:

- a) aliĝi al tiu ĉi statuto,
- b) pagi la kotizon kiu respondas al la elektita katgegorio.

## Artikolo 6 **Malmembriĝo**

Membrecon oni perdas per morto, demisio aŭ eksigo pro pruvita grava motivo. Ne-pagado de kotizoj rezultigas suspension.

## Artikolo 7 **Rimedo de la asocio**

La rimedo de la asocio konsistas el:

- a) la sumo de la kotizoj (kiujn fiksas la komitato kaj aprobas la ĝenerala asembleo),
- b) subvencioj de la ŝtato, la departemento kaj publikaj organoj,
- c) enspezoj el vendado (al membroj de la asocio) de libroj kaj diversaj pedagogiaj dokumentoj,
- d) enspezoj el restadoj (kontribuoj de la membroj al [la kostoj de] manĝado kaj loĝado).

## Artikolo 8

La asocio povas, sen speciala rajtigo:

- agi en proceso,
- akiri kontraŭ pago, posedi kaj administri, sendepende de subvencioj de la ŝtato, la departemento kaj publikaj organoj:
  - a. la ejojn uzatajn por administrado kaj por kunvenado de la membroj,
  - b. la moveblaĵojn kaj nemoveblaĵojn necesajn por siaj aktivadoj.

## Artikolo 9 **Komitato**

La asocion gvidas komitato kun 5 ĝis 9 membroj, kiujn elektas por tri jaroj la ĝenerala asembleo kaj kiuj estas reelekteblaj.

La komitato elektas inter siaj membroj, per sekreta voĉdono, *estraron* konsistantan el:

- a) prezidanto,
- b) unu aŭ pluraj vicprezidanto(j),
- c) sekretario kaj, se necese, help-sekretario,
- d) kasisto kaj, se necese, help-kasisto.

La komitato estas renovigata trione ĉiun trian jaron; en la unua kaj la dua jaroj la elirantaj membroj estas nomotaj per lotumo.

Okaze de vakeco, la komitato provizore anstataŭigas siajn membrojn. La definitivan anstataŭigon faras la plej baldaŭ sekvanta ĝenerala asembleo de la membroj.

## Artikolo 10 **Kunsidoj de la komitato**

La komitato kunsidas almenaŭ unu fojon jare, laŭ kunvoko de la prezidanto kaj eventuale laŭ peto de almenaŭ tri el siaj membroj.

Decidoj estas faritaj per plimulto de la voĉoj; okaze de voĉegaleco superas la voĉo de la prezidanto.

Ĉiun membron de la komitato kiu, sen senkulpigi sin, ne ĉeestis en tri sinsekvaj kunsidoj eblos konsideri demisiinta.

#### Artikolo 11

### **Ordinara ĝenerala asembleo**

La ordinara ĝenerala asembleo konsistas el ĉiuj membroj de la asocio, aliĝintaj en kiu ajn kategorio, kiuj estas ĝisdataj pri siaj kotizoj. La ordinara ĝenerala asembleo kunvenas unu fojon jare je dato kiun fiksas la estraro.

La membroj de la asocio estas kunvokitaj unu monaton antaŭ la fiksita dato. La kunvokilo enhavas la tagordon.

Nominte tagprezidanton, la prezidanto helpate de la membroj de la komitato prezentas la agadraporton kaj proponas ĝin por aprobo al la asembleo.

La kasisto raportas pri sia mastrumado kaj proponas la jarajn kontojn por aprobo al la asembleo.

Post fintraktado de la tagordo oni anstataŭigas, per sekreta voĉdono, la elirintajn membrojn de la komitato.

Membroj povas skribe sendi al la prezidanto, 15 tagojn antaŭ la dato de la asembleo, la demandojn kiujn laŭ ilia deziro pritraktu la ĝenerala asembleo.

Ĉiu membro rajtas havi unu voĉon; membroj forestantaj povas doni mandaton por reprezentigi sin; ĉiu ĉeestanta membro povas havi maksimume kvin mandatojn.

Devas esti pritraktataj dum la ĝenerala asembleo nur la demandoj enskribitaj en la tagordo.

Decidoj estas faritaj per absoluta plimulto de la membroj ĉeestantaj kaj mandate reprezentataj; en ordinara ĝenerala asembleo devas esti ĉeestanta aŭ reprezentata almenaŭ sesono de la membroj. Okaze de dua kunvoko, se tio necesas, kvorumo ne plu estas postulata.

#### Artikolo 12

### **Eksterordinara ĝenerala asembleo**

Se necesas, aŭ per decido de la komitato aŭ je peto de triono plus unu de la registritaj membroj, la prezidanto povas kunvoki eksterordinaran ĝeneralan asembleon, laŭ la formalajoj preskribitaj en Artikolo 11 de tiu ĉi statuto.

#### Artikolo 13

### **La prezidanto**

La prezidanto reprezentas la asocion en ĉiuj agoj de la civila vivo. Li donas rajtigojn pri elspezoj. Li povas delegi siajn povojn al unu el la membroj de la estraro.

Okaze de reprezentiĝo en proceso, la prezidanton povas anstataŭi nur mandatulo aganta sur bazo de speciala prokuro.

Reprezentantoj de la asocio devas plene disponi pri siaj civilaj rajtoj.

#### Artikolo 14

### **Librotenado**

Estas tenataj kontlibroj, kiuj aperigas ĉiujare spezokonton kaj jarrezulton. Tiujn dokumentojn aprobas la kontkondrolistoj antaŭ ol oni prezentas ilin al la ĝenerala asembleo.

#### Artikolo 15

### **Moveblaĵoj kaj nemoveblaĵoj akirado kaj mastrumado, forcedo, aliproprigo**

La decidojn de la komitato rilatajn al akiro, interŝanĝo, forcedo aŭ aliproprigo de moveblaĵoj kaj nemoveblaĵoj necesaj por la celoj de la asocio devas aprobi la ĝenerala asembleo de la membroj.

#### Artikolo 16

### **Interna regularo**

Se necese, internan regularon povas starigi la komitato, kiu ĝin aprobigas fare de la ĝenerala asembleo de la membroj.

#### Artikolo 17

### **Modifado de la statuto**

La statuton eblas modifi nur laŭ propono de la komitato aŭ de du trionoj de la membroj kaj per aprobo de du trionoj de la membroj ĉeestantaj kaj reprezentataj en la ĝenerala asembleo kunvokita tiucele.

Ĉiu ŝanĝo farita en la statuto kaj en la administrado de la asocio devas esti deklarita per depono de la nova statuto akompanata de la protokolo de la kunsido en la distrikta subprefektejo ene de trimonatoj post la dato de la koncerna ĝenerala asembleo.

#### Artikolo 15

### **Malfondo**

Malfondon de la asocio eblas decidi nur je iniciato de la estraro aŭ de la komitato aŭ laŭ propono de duono de la membroj de la asocio kaj per aprobo de du trionoj de la membroj ĉeestantaj kaj reprezentataj en la ĝenerala asembleo kunvokita tiucele; la ĝenerala asembleo nomos unu aŭ plurajn komisiito(j)n kun la tasko likvidi la havaĵojn de la asocio.

La ĝenerala asembleo povas atribui la netan aktivon al iu(j) organizaĵo(j) aŭ asocio(j) esperantista(j) havanta(j) celojn konformajn al tiuj de la malfondita asocio.

Ĉiukoze estos starigita etato priskriba kaj valortaksa de la moveblaĵoj kaj nemoveblaĵoj.